

EKO 2021

Esperigaj Komunikoj

Je via servo tra ok
jaroj, depost 2013
2020: rekorda jaro:
kun 60 komunikoj
Subtene al la loka,
landa, faka kaj
regiona agado

EKO 2021-26 sendita el Budapeŝto la 14an de julio


Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Kun plusendoj pli ol 2000.

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

Kurso de la Jaro – la dua ripeto venis al fino!

Kun ĝojo mi dividas kun vi, ke unu el la ĉefaj agadoj de UEA ĵus finis sian duan okazigon: la Esperanto-kurso por hispanparolantoj 2021 fermiĝis la 10-an de julio, post dumonata praktikado kun 12 instruistoj kaj centoj da lernantoj el diversaj landoj.

Aparte ĝojiga estas la momento de la fermo, kiam la lernantoj dividas siajn atestojn kaj impresojn pri la kurso. Iri rekte al tiu parto eblas per la jena ligilo: <https://youtu.be/dV0U7XJwVfl?t=2968> - ĉiuj lernantoj estis speciale invititaj al la 2-a Virtuala Kongreso de #Esperanto Se vi ankoraŭ ne aliĝis, konsideru aliĝi ĉe vk.esperanto.net - kaj veni interŝanĝi kun ili.



La rezulto estas nekredibla. Eblas re-spekti la tutan ferman ceremonion en UEAviva:

<https://youtu.be/dV0U7XJwVfl?t=97> - salutas la instruistojn kaj lernantojn Duncan Charters, Fernando Maia kaj Martin Schaeffer deflanke de UEA. Klara kaj Albert prezentas al ili TEJO-n. Indas sekvi la tutan okazon, ĉar ankaŭ ĉiuj instruistoj faras siajn salutojn. La komenco okazas parte en la hispana, parte en Esperanto, sed poste la tuto estas en Esperanto. Mi esperas, ke la atestoj de la lernantoj ĝojigas vin samkiel ĝojigis min.



Koran dankon al Kolombia Esperanto-Ligo, Hispana Esperanto-Federacio, TEJO kaj ĉiuj bravaj 12 instruistoj pro la kunlaboro por tiu agado. Se iu volas subteni tiun agadon, donacoj bonvenas al la Fondaĵo Ameriko de UEA: uea.org/alighoj/donacoj/ameriko.

Fernando Maia Jr, vic-prezidanto de UEA.

Servo subtenata de
Universala
Esperanto-Asocio
kaj Internacia Ligo
de Esperantistaj
Instruistoj



Redaktoroj:
Stefan MacGill kaj
Mirejo Grosjean



ENHAVO

- Kursofin' tra latinameriko
- Kolombo flugas jam kvinfoje
- Poezio pozas
- Tago de Lernado en VK 2
- Instruista enketo por VK2
- Serbia progreso

La Kolombo de Paco persiste flugas

Aperis la tria, kvara kaj kvina numeroj de La Kolombo de Paco, la kuriero de la 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto. Legu, ĝuu, senpage elŝutu, libere kaj aktive diskonigu ilin al viaj amikoj en Esperantujo!

https://revuoesperanto.org/kolombo_5

https://revuoesperanto.org/kolombo_4

https://revuoesperanto.org/kolombo_3

Kolombo 5 enhavas preparan raporton por AMO 74, okazonta en la 24-an de julio (ĵaŭde). Ĉefrolas en tio la prezidanto de UEA, Duncan Charters kaj la patro de AMO, Stefan MacGill. La antaŭvidata programo estas libera forumo pri la temo 'Kiel altiri pli da junaj membroj tra Eŭropo.'

Poezio en aktiva ĉina klubo en Liaoning

Por la ĉi-jara Esperanto-tago (la 26-a de julio) nia agado, la 2-a Liaoning-a Recitado de Esperantaj Poemoj okazonta en la 25-a de julio, estas en streĉa kaj orda preparado. Neatendite nia agado jam vekis grandan atenton en socio. Vere ni kore dankas neesperantistajn grupojn pro granda subteno. Ili ne nur sendos reprezentantojn ĉeesti, sed senpage ofertas la kunvenejon, aĉetis belajn prezent-vestojn por leg-aktoroj, elektis la profesiajn reĝisorojn, sendos la famajn ĉefparolistojn de radioj kaj televido, gastigos ĉiun partoprenanton kiel noblan gaston per la okcidenta manĝaĵo antaŭ tiu ĉi Esperanta-kultura manĝaĵo.

Niaj neesperantaj gastoj pli profunde scios pri nia lingvo kaj ĝia kulturo tra la recitado. Certe ni daŭre akceptas la bondeziron el vi ĝis la 10-a de julio.

Wu Guojiang, Prezidanto de Liaoning-a Esperanto-kultura Klubo (LEKK), Ĉinio
Retadreso: ghemelurboj@sina.cn

Tago de Lernado ene de VK2

Jam de Jardekoj tiu Tago okazigita de ILEI havas gravan lokon en la kongresaj programoj de UEA. Tradicie, tio estis la krona evento de la Tago de Kapablago, ĉiam en la kongresa mardo. Simile okazos ĉi-jare, kun la aranĝo de premier-ranga programo okazonta denove en la mardo, kaj aranĝita kiel jam multjare de Marija Beloŝeviĉ el Kroatio.. Jen laa programo prenita el la retejo de ILEI.

Programo 2021-07-20, 12.00-16.59 UTC: (CEST du horojn pliposte)

12.00-12.00: Salutoj: prezidantoj de UEA kaj ILEI

12.10-12.40: Duncan Charters: Paco kaj konfido en la mondo de edukado

12.40-13.00: Mireille Grosjean: Ne okazas lernado sen fido

13.00-13.30: Goro Christoph Kimura: Kio estas interlingva diverseco kaj kial ni bezonas ĝin?

13.30-14.00: Martina Kvarantan Šmitran: De aplaŭdo al konfido - filmita

14.00-14.30: Mónika Molnár: Konfido kaj memkonfido en la klasĉambro

14.30-15.00: Diskuto

15.00-15.30: Katalin Kováts: Per kio kion kaj kiel instrui?

15.30-16.00: Dennis Keefe: Praktika bildvortaro, filmita

16.00-16.30: Vicente Manzano-Arrondo: Iniciato "Esperanta universitato"

16.30-16.50: Diskuto

16.50-16.55: Fermo

Franca komunikado pri virina pionirismo

Eksterseria numero de la franclingva informfolio "Espéranto-Vendée" estas elŝutebla ĉe :

https://esperanto-vendee.fr/images/PDF/EV-HS-juillet_2021.pdf

aŭ (plena kolekto) : <http://esperanto-vendee.fr/index.php/l-association/la-lettre-de-l-association> (N° Spécial Juillet 2021)

Enketado pri lerniloj – instruistoj respondu!

Edukado.net lanĉis enketon pri la lerniloj, kiujn oni uzas nuntempe por INSTRUI Esperanton. Do, ni nun demandas NUR instruistojn. Ni scivolas pri tio, kiuj lerniloj (libroj kaj aliaj materialoj) estas la plej popularaj kaj kial. La eksplikitaj demandoj rilatas principe al internacie uzataj lerniloj, sed estas eblo listigi viajn nacilingvajn lernilojn, pri kiuj ni scivolas. La rezultojn de la enketado Katalin Kovats ŝatus prezenti dum la Tago de Lernado dum la Virtuala Kongreso. Bonvolu helpi, por ke ni havu larĝan supervidon pri la situacio.



Jen la ligilo al la enketo: <https://forms.gle/ztMSjdsrWadNvRMk6>

Katalin Kovats, redaktoro de www.edukado.net

Serbia reviviĝo – reveno post dekjara hiato

Serbia Esperanto-ligo la 25-an de julio sukcese reregistriĝis en la ŝtata registrejo. Ni estas pretaj oridigi niajn rilatojn kun UEA. Jen nomoj de la novaj estraranoj: Jovan Zarković – prezidento; Nedeljka Ložajić – vicprezidentino; Miloš Crnobrnja – sekretario; Živanko Novakov – ano; Saša Pilipović – ano.

La asocia adreso: Udruženje naučnih i stručnih prevodilaca Srbije, Kičevaska 9, 11 000 Beograd. Por kontaktado uzu la adreson de la sekretario: nigramilos@gmail.com

La EKO-komunikoj deziras grandan sukceson al la nova asocio kaj komunumo

===== vortoj: 840 =====

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis la fino de majo 2021 (per EKO 2021-22). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro deponitaj 2013

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill@ gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldona al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.